

# esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 3 / 2012



## Saluton Kara Legantaro !

En nia antaŭa numero, ni prezentis artikolon pri kvar vizioj en Esperantio. Tute hazarde, ni aŭskultis radio-elsendon kun Jose Antonio Vergara kiu parolis pri sia ideo de «plivastismo». Specialan substrekon meritas la fakto ke li tute ne deziras plivastigi Esperanton nek per finvenkismo, nek per raŭmismo. Sur la 4a paĝo, ni transskribis fragmentojn de la intervjuo kaj ni aldonis artikolon pri tiu temo sur paĝoj 5a kaj 6a.

Aliflanke, eble oni devus demandi sin : Kial ne disvastigi la lingvon per pli moderna kaj efika prezento ?

Certe la junuloj (sed ne nur !) ŝategus vidi pli-aktualajn konceptadojn en Esperantio.

La francoj ege bone sukcesis prezenti la peticion «l'espéranto-au-bac» laŭ tre alloga maniero. Brave ! Ĝi estas multkolora, mojosa, malarkaika, ktp ...

Se oni rilatas Esperanton al nia mondo de krisoj, de kreskanta maljusteco, opreso, terura kapitalismo, ... oni agnosku ke Esperanto pli-malpli bone travivas.

La esperantia vizaĝo multe ŝanĝiĝis pro Interreta fenomeno kiu permesas facilan atingon por lerni ĝin, por legi,



aŭskulti radio-elsendojn, renkonti unu la aliajn, ... kaj uzi la lingvon por plitaŭgaj celoj : politikaj, turismaj, muzikaj, teatraj, ktp ... Bona signo estas ke en la Interreta pejzaĝo, «Google» uzas freŝdate Esperanton kiel traduka lingvo.

Oni povus diri ke la magnetoj kiuj allogas novajn esperantulojn troviĝas precipe sur la Interreto, kiu ŝajnas nuniĝi tre grava regiono en Esperantio.

**Ni deziras al vi ĉiuj ĝojan someron kaj bonajn feriojn !**

... Kaj ankaŭ, ne forgesu paroli cirkaŭ vi pri la franca peticio, ĉefe se vi ferios en Francio.

Estas facile trovebla surrete :

[www.esperanto-au-bac.fr](http://www.esperanto-au-bac.fr) .

Ĝi finiĝas en Septembro. Ne maltrafu ĝin !

Laur' & Samy

[aktuala@esperantobruselo.org](mailto:aktuala@esperantobruselo.org)

### Enhavo :

- Paĝo 3 :**       **Eventoj**
- Paĝo 4 :**       **Radio-intervjuo 3ZZZ**
- Paĝo 5, 6 :**   **Estas multe pli valora**
- Paĝo 7 :**       **Esperanto au bac**
- Paĝo 8 :**       **Kongreso de EEU en Galivo**
- Paĝo 9 :**       **Reklamo / Ludo**
- Paĝo 10 :**      **Radikaliĝo (fragmento)**
- Paĝo 11 :**      **La reta PIV**
- Paĝo 12 :**      **Suno Feliĉigas printempe**
- Paĝo 13 :**      **Recepto**
- Paĝo 14 :**      **NIES en Pakistano**
- Paĝo 15 :**      **Poemo (Jacques Prévert)**
- Paĝo 16, 17 :**  **EU rifuzas himnon en Eo**
- Paĝo 18 :**      **Prelego de Lila (fotoj)**
- Paĝo 19 :**      **Nia sezonzona vespermanĝo**
- Paĝo 20 :**      **Eventaj fotoj**



36a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : [aktuala@esperantobruselo.org](mailto:aktuala@esperantobruselo.org) ;  
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara  
 neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur  
 Belge» kun la  
 n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957.

**Prezidanto** : Angelos Tsirimokos ; [prezidanto@esperantobruselo.org](mailto:prezidanto@esperantobruselo.org) ; **Kasisto** : Jan Amadori [jan.amadori@gmail.com](mailto:jan.amadori@gmail.com)

**Sekretario** : Laurent Loisse : [sekretario@esperantobruselo.org](mailto:sekretario@esperantobruselo.org)

**Abona membriĝo** : 10 eŭroj jare, konto **IBAN** : BE64 0000 1230 4852, **BIC** : BPOTBEB1 de la Esperantista Brusela Grupo

**Kunvenejo** : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝkesto, nek

telefono . **Informoj** : [www.esperantobruselo.org](http://www.esperantobruselo.org)

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

## Agendo

### Junio 2012

|                        |   |
|------------------------|---|
| <b>Merkredo la 13a</b> | Semajna kunveno kaj kursoj  |
| <b>Sabato la 16a</b>   | Eo-Kafejo en Bruselo (Brasserie SiSiSi)   |
| <b>Merkredo la 20a</b> | Semajna kunveno kaj kursoj  |
| <b>Sabato la 23a</b>   | 6a KuPro (KUrso por PROgresantoj) <b>i</b> : <a href="mailto:ademarque@skynet.be">ademarque@skynet.be</a> |
| <b>Merkredo la 27a</b> | <b>Sezonfina verpermanĝo : Cité du Dragon</b> (paĝo 19)   |

### Julio / Aŭgusto 2012

Tradicie, ne okazas kunvenoj nek kursoj dum la someraj monatoj  
 tamen ĉi-jaron la grupo de Nikolao daŭrigos la kursojn neformale en Julio.  
 Ĉiu persono menciita sur la listo por eniri la konstruaĵon estas bonvena.  
 Plej verŝajne, okazos dum la somero unu aŭ du **Esperanto-Kafejo en Bruselo**.  
 Inviton estos sendita kiel kutime. Por la personoj kiuj ne havas retroŝtadreson  
 kaj kiuj volas ekscii pri tiaj agadoj, bonvolu kontakti Nikolao. <sup>(1)</sup>

|  |   |
|--|---|
| <b>16a - 20a de Julio</b>                                    | 9a kongreso de EEU en Galivo, Irlando (paĝo 8)                                      |
| <b>Ekde la 21a de Julio</b><br><b>-ĝis la 20a de Aŭgusto</b> | Kastelo Greziljono (Francio) :<br>Somera programo (arto, muziko, pupteatro, ktp...) |
| <b>17a - 24a de Aŭgusto</b>                                  | FESTO en Metabief (Francio)   |

### Septembro 2012

|                        |                           |
|------------------------|---------------------------|
| <b>Merkredo la 12a</b> | Unua post feria kunveno   |
| <b>Merkredo la 19a</b> | Semajno kunveno kaj kurso |
| <b>Merkredo la 26a</b> | Heidi GOES pri Indonezio  |

<sup>(1)</sup> Nikolao : [nikolao@esperantobruselo.org](mailto:nikolao@esperantobruselo.org) aŭ per telefono, vespere : 0478 382 981

## Intervjuo kun Jose Antonio Vergara

El la radio-elsendo de la 16a de Januaro 3ZZZ / 47a minuto, post la kanzono de jOmO : «La virbovo kaj la luno»)



3ZZZ estas etnika radio el Aŭstralio kiu havas programojn en pli/malpli 70 lingvoj kies Esperanto.

En tiu elsendo, Jose Antonio Vergara proponas (pli-evidentan !) strategion por tentigi, logigi nian lingvon.

Esperanto konsiderita kiel «ĉies dua lingvo», ktp ... povas esti grava. Tamen unue, oni plibone montru valoregajn flankojn de Esperanto.

Li komencis la intervjuon dirante ke «*UEA estas la plej grava kaj utila afero por subteni Esperanton plej diversmaniere. Estas plurisma asocio : Ĉiuj estas bonvenaj !*»

Tamen, li tute ne plu subtenas en UEA la ideon de FINVENKISMO, kiu signifas «*ke la mondo finfine fariĝos esperantista, ke ni devas strebi ĝis kiam Esperanto venkos kaj estos ĉies dua lingvo. Ĝi tute ne povas esti motivo por iĝi esperantuloj, por lerni kaj uzi Esperanton. Estas danĝere prezenti nin tiel.*»

Ankaŭ, li malkonsentas la «*RAŬMISMO-n*», «*laŭ kiu la Esperantistoj estus kvazaŭ membro de iu diaspora lingva minoritato. Ke la sola rolo estu tio ke Esperanto iĝu aŭ plu estu kultura lingvo de supoza lingva minoritato*».

Do, Jose Antonio Vergara prezentas fine sian vizion pri Esperanto, kiu li elpensis kaj nomis «*PLIVASTISMO-n*»:

«*Esperanto estas multe pli ol iu speco de mal-angla.*

*Estas homoj kiuj, jes prave, protestas aŭ kritikas la maljustan lingvan sistemon de la mondo laŭ kiu la angla pli kaj pli ludas hegemonian rolon. (...)*

*Multaj homoj jam konstatas ke la angla iel funkcias, kun problemoj, (...) tamen estas fakto : ĝi funkcias (...).*

*Laŭ mia sinteno, estas iom danĝere prezenti nin kvazaŭ ni estus la opoziciantoj.*

*(...)*

*Se oni proponas al la homoj ke ili iĝu Esperantuloj por kontraŭbatali tion, estas tro peza ŝarĝo. La homoj ne volas engaĝi sin en tiel bataladon.*

*Se oni proponas Esperanton nur kiel batalo kontraŭ la angla, tio disigos nin, eĉ pli fremdigos nin de la ceteraj homoj.*

*Tiel, mi proponas la realon : Esperanto estas **alternativa maniero «lingvumi».***

***Estas tre krea, kaj (intelekte) stimula maniero krei, trovi amikojn, verki, legi, instrui, eduki, eduki sin, kaj tiel plu ... (...)***

*Kion ni volas ?*

*Ĉu ni volas la finan venkon ? ... Aŭ ĉu ni volas ke Esperanto, kiel **memstara, kunkrea, kunlabora fenomeno**, iĝu pli kaj pli vasta ĉiam laŭ ĉiuj direktoj ? Ke estu pli da libroj, pli da tradukoj, pli da homoj kiuj partoprenas niajn kursojn, pli da ... **ĝuado** ! Ĉar temas ankaŭ pri speco da alternativa hedonismo.*

*Nii bonŝance multe ĝuas la fakton ke Esperanto ekzistas kaj permesas al ni havi pli homajn rilatojn trans ĉiajn barojn. Esperanto estas valorega en si mem.*

*Ni ĉesu nur batali kontraŭ la angla, ĉar tio ne plu havas sencon. Oni devas anstataŭe koncentriĝi al la riĉeco kaj boneco kiujn Esperanto mem proponas al la homaro. (...)*

<http://melburno.org.au/3ZZZradio/2012/01/>



## Esperanto estas multe pli valora ol speco de malangla aŭ identecofonto de supozata "popolo"

Mi kundividas plurajn elementojn el la interesa analizo de **Trevor Steele**



(<http://sezonoj.ru/2011/10/steele/>), sed ne lian konkludan miksaĵon de iom da raŭmismo kun speco de milda finvenkismo celanta teni Esperanton viva ĝis la mondo maturiĝos por ĝi.

Ja veras ke antaŭ longe estis tempo en la historio de la tutmonda socio kaj ĝia lingva sistemo, kiam ankoraŭ eblis imagi iomajn ŝancojn ke konstruita interlingvo povus ĝui ĝeneralajn agnoskon kaj enkondukon kiel pli racia kaj justa ilo por plenumi la kreskantan bezonon je internacia lingvo. Inspirataj de tiu nobla idealo, dum pluraj jardekoj multaj esperantistoj pene strebis atentigi la mondon pri ties "lingvoproblemo" kaj pri Esperanto kiel taŭga solvo por ĝi, bedaŭrinde kun tre limigitaj atingoj en tio.

Dume tamen, nek planite nek atendite, la mirindaj trajtoj de Esperanto mem kaj la intensaj agemo, kreemo kaj kunkonstruemo de la homoj vivigintaj ĝin sukcesis doni al la ĝenerala ideo "lingvo por internaciaj rilatoj" pli konkretan, fakte tute Zamenhofan enhavon, nome plej diversajn *interhomajn* rilatojn trans ĉiuj baroj.

Malgraŭ tiu etskala fenomeno, tra kompleksaj historiaj procezoj, ĉefe sed ne nur klarigeblaj per imperiisma lingvopolitiko kaj la tutmonda merkato de ĉio ekzistanta, estis la angla lingvo kiu iĝis pli kaj pli reganta en la uzoterenoj kiujn la esperantistoj de antaŭaj generacioj kredis "nature rezervitaj" por la iam triumfonta Esperanto (scienco, komerco, turismo, ktp).

Tiu evoluo, rapide akceliĝinta dum la lastaj du jardekoj, ja havas ege maljustan flankon, sed ĝi iĝis fakto de la nuna mondo kaj ties komunikteknologia revolucio.

Do, en tiel profunde ŝanĝiĝinta scenejo, **Grigorij Arosev** (LOdE, 2011, №10)



tute pravas je tio kion li diagnozas kiel "malaltiĝo de la valoro de Esperanto kiel internacia komunikilo", laŭ la kriterioj kiujn la tradicia Esperanto-propagando antaŭe emfazis kiel ĉefaj allogaĵoj de nia lingvo (kontaktoj en aliaj landoj, ktp). Li ankaŭ agnoskas ke la homoj prave emas lerni pli utilan fremdan lingvon ol Esperanton.

Fronte al tiu nuna procezo, ĉe ni estas iuj kiuj opinias tiujn lernantojn de la angla nur pasivaj viktimoj de la cirkonstancoj aŭ malkuraĝaj submetiĝemuloj, kaj insistas ke la ĉefa ekzistokialo de Esperanto plu restas batali kontraŭ la uzado de nacia lingvo kiel internacia lingvo ("hieraŭ la franca, hodiaŭ la angla, morgaŭ la ĉina"). La sole inda motivo subteni Esperanton estus do la morala respondeco rezisti la potencorilatojn kiuj nun privilegias la anglan lingvon.



Ja tiu David-kontraŭ-Goliata, epopea sinteno estas forte alvoka, sed mi timas ke per tio la plej radikalaj finvenkistoj fakte ŝarĝas la porEsperantan agadon per absurde tropostula eksterproportiaĵo, kies sola efiko verŝajne estas ŝajnigi nin marĝenaj kontraŭemuloj, strangaj defendantoj de malvenkinta iluzio, ne plu sencohava. Se ni emfazas tiun bildon de heroa rezistmilto kiel ĉefan motivon por lerni Esperanton (ĉar ĝi estus *la* sole vere inda por plenumi la rolon de internacia lingvo, male al la uzurpanta angla)

ni plu fremdigos la ceterajn homojn disde nia tamen ja liberiga, emancipa fenomeno.

Esperanto ja estas ilo por ŝanĝ(et)i la mondon, sed eble ne tute precize laŭ tiu ekstreme ambicia programo, al kies venkoŝanco komplete mankas kredindeco. Multo estas jam atingita (eĉ se je

modesta skalo), ke danke al Esperanto multe da bono okazis al konkretaj homoj en pluraj generacioj, tiel ke ĝi daŭre fascinas novulojn kaj trovas novajn terenojn, dum ĝi riĉigas la vivon de tiuj trovintaj ĝin.

Ĝuste la dogma misiemo ŝajne emas senvalorigi preskaŭ ĉion de la reala Esperanta vivo, ĉar ĉio tio (la amikiĝoj, la libroj, la muziko, ktp) estus aŭ kromefiko aŭ nura sinindulgemo, eble iom interesa sed ne la "vera" celo de Esperanto kaj do deflankiga, malŝpara de tempo kaj energio.

Ĉi-rilate, mi opinias ke la Manifesto de Raŭmo (1980) trafe kaj tre kuraĝe esprimis siatempe kritikon al iuj ne plu utilaj mitoj en la Esperanto-agado (dua lingvo por ĉiu / la angla lingvo estas nia malamiko / UN devas adopti Esperanton) kaj prave emfazis la indecon disvastigi Esperanton por realigi ĝiajn pozitivajn valorojn (sendiskriminaciaj kontaktoj inter ordinaraĵoj homoj, novtipa internacia kulturo, ktp). Ĉu tamen la vera raŭmismo havis la apenaŭnan kulturflegeman karakteron kiun atribuas al ĝi iuj finvenkistoj?

Mi konfesu ne multe interesiĝi pri iu supozate distinga, specifa Esperanta kulturo, sed pri la aspektoj tiel universalaj kiel plurece apartaj de la homara kulturo, kiuj ne hazarde ankaŭ trovas Esperanton por sin esprimi. La milda tropo uzita en tiu manifesto pri la esperantularo kiel "mem elektita diaspora lingva minoritato" estas bela, sed povus esti miskomprenata kiel apartiganta nin

disde la ceteraj homoj, kvazaŭ estus io esence speciala en la fakto esti esperantulo.

Lastatempe mi emas nomi "plivastismo" la reale ekzistantan sintenon kiun mi

rekonas ĉe multaj esperantuloj (kiel mi mem). Temas pri homoj kiuj amas Esperanton, elvivas ĝin kiel gravan eron de sia vivo, opinias ĝin valorega praktika ilo de tuthomara, tergloba konscio sur/per la plej

homa trajto (la lingvo), kaj eventuale provas diversmaniere kontribui al ĝiaj prestiĝo, videbligo kaj pluvivigo, ankaŭ de ties organiza branĉo (UEA, ktp). Samtempe tamen, malgraŭ la severa admono de iuj finvenkistoj, ili permesas al si ĝui la intense homigan rolon kiun Esperanto ludas en siaj respektivaj vivoj (per kultura kreado, intelekta stimulo, diversspecaj emocioj, egaleca amikiĝo kun aliaj homoj, alternativa ŝatokupo, ktp) kaj samtempe kelkaj el ili faras kion ili povas por malferme inviti aliajn homojn kunkonstrui tiun ĉi novspecan fenomenon kaj fari ĝin eĉ pli ampleksa, pli plureca, pli interesa.



Oni sincere bonvenigas ĉiun ajn iniciaton iel ajn kontribuantan al la plivasteco de tio atingita de Esperanto, ekzemple, la esperantigo de sciencaj verkoj aŭ la kreskanta ĉeesto de esperantuloj en sociaj retoj kiel Facebook. Temas pri sinteno kiu atribuas valoron al ĉio ajn kio jam nun helpas

pligrandigi kaj pliriĉigi nian mondeton Esperantujo.

Kiel tre speciala homa kaj fakte homiga iniciato, la motivoj okupiĝi pri Esperanto evoluas kaj estas plurecaj, kiel ĉio homa.

**José Antonio Vergara**

*La Ondo de Esperanto*. 2011.  
N<sup>o</sup>12 (206)





Kelkaj politikistoj el la franca prezidenta kampanjo kiuj subskribis la peticion :



## Rifuzo de subskribo (kaj eĉ pli) de Nicolas Sarkozy

publikigita la 24an de Aprilo 2012 sur la ttt-ejo [www.esperanto-au-bac.fr](http://www.esperanto-au-bac.fr) (franclingve) :

*Nous recevons aujourd'hui la réponse de Nicolas Sarkozy.*

*La lettre considère que si l'espéranto est "porteur d'un bel idéal de fraternité" "cette langue ne remplit pas les conditions nécessaires pour faire l'objet d'un enseignement institutionnalisé à l'école".*

*Au cas où nous n'aurions pas compris la phrase précédente, il est ajouté : "il n'est donc pas envisageable d'accroître l'offre des langues au baccalauréat avec l'espéranto".*

*La réponse s'appuie sur le fait que certaines langues n'ont pas assez de candidats reprenant mot pour mot le rapport "Propositions pour une évolution du baccalauréat" présenté le 12 mars 2012 qui avait entraîné une réponse de notre part publiée ici :*

<http://esperanto-au-bac.fr/spip.php?article25>

*(Parution d'un rapport de «Propositions pour une évolution du baccalauréat»)*

*Ainsi l'espéranto est non seulement écarté sans avoir le droit d'être "testé" - il est considéré a priori que l'épreuve d'espéranto n'intéressera personne - mais il est assez clair que d'autres langues ne seront plus enseignées.*



Ne

Nicolas Sarkozy rifuzis subteni la enigon de Esperanto por la abiturienta ekzameno pro la ĉefaj kialoj ke Esperanto ne taŭgas por esti instruata en lernejoj, ke estas jam tro da lingvoj proponataj.



## **9-a kongreso de EEU, Irlando 2012**

EEU plezure invitas vin al la 9-a kongreso de EEU kiu okazos en Galivo (Gaillimh/Galway), Irlando, inter la 16-a kaj la 20-a de julio 2012. Kongresejo estos hotelo Ardilaun en Galivo, la pitoreska ĉefurbo de la okcidenta parto de Irlando, kun 70,000 enloĝantoj, situanta ĉe Atlantika Marbordo. Kongresoj de EEU okazas ĉiun duan aŭ trian jaron kaj estas bona okazo por Eŭropaj esperantistoj interŝanĝi ideojn por esperanta agado en Eŭropa Unio, nun multe pli grava pro la ĉiam pli granda kvanto da oficialaj lingvoj - nun jam 23 oficialaj kaj 5 “duonoficialaj” lingvoj.


Ĉeftemo estos “Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli” kun emfazo pri lernfaciligaj ecoj de Esperanto por lernado de aliaj lingvoj. Tio aparte gravas post la akcepto de la rekomendo ke “endas esplori kiu dua lingvo pli verŝajne kuraĝigas la lernadon de tria kaj aliaj lingvoj” 30-an de marto 2011 fare de la Plaftormo por Multlingveco de la EU-Komisiono (reprezentante 29 tuteŭropajn organizaĵojn, 28 el ili neesperantistaj). Tiu rekomendo kaj 140-paĝa oficiala raporto sur kiu ĝi baziĝas, povos malfermi gravan pordon al Esperanto, se ni scipovos efike uzi ĝin. Dum la kongreso tial estas antaŭviditaj prelegoj de gravaj lingvaj fakuloj, laborejoj kaj diskutejoj. Kompreneble, kiel ĉiam, atendas vin ankaŭ riĉa

kulturprogramo kaj turismaĵoj. Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj ebligas al vi ekkoni belegan naturon en la regiono kaj kondukos vin al Dublino, Aran insuloj, Conamara/Connemara nacia parko kaj aliaj vidindaĵoj. Venu kaj kontribuu, ĝuu kaj lernu!

Seán Ó Riain,  
prezidanto de EEU







Amuzo ĉe via festo kaj bona etoso garantita!

Hodiaŭ aperas la unua iPhone-ludo en Esperanto, Word Race. Ĝi estas nekutima ludo pro tio, ke oni ludas grupe kun amikoj anstataŭ sole.

Oni devas klarigi vorton al sia teamo sen uzi la malpermesitajn vortojn. Vi tiel povos vidi kiom esprimplena estas nia lingvo kaj kiom ĝi pli-boni-gos vian kreivecon!

Ekzemple, se la vorto estus "barbo", oni ne rajtus diri "haroj" aŭ "Zamenhof". La teamo, kiu plej rapide klarigas siajn vortojn, venkas!

La provludo senpagas, sed per lanĉoferto oni povas aĉeti la ĝeneralan vortpakadon kontraŭ 2,39€ (kutime kostas 2,99€). Ni ankaŭ poste volas eldoni vortpakadon nur pri Esperanto-kulturo!



<http://www.wordraceapp.com>



### Kiel traduki la francan vorton "plat" en Esperanto?

1. Cette région est plate (peu de relief): tiu regiono estas .....
2. Ce morceau de bois est plat (sa surface est plane): tiu peco el ligno estas .....
3. J'ai un ordinateur avec écran plat: mi havas komputilon kun ..... ekrano
4. Elle apporta le plat à table: ŝi alportis la ..... sur la tablon
5. Le doigt glisse facilement sur la surface plate (lisse): la fingro facile glitas sur la ..... supraĵo
6. Le plat de la lame de ce couteau: la ..... de la klingo de tiu tranĉilo

7. Cette blague est plate (n'a pas les caractéristiques d'une vraie blague): tiu ŝerco estas .....
8. Ce pays est plat (banal, sans charme): tiu lando estas .....
9. Cette conférence est plate (peu intéressante): tiu prelego estas .....
10. Ceci est un angle plat (180°): tio estas ..... angulo

**Estas pli ol unu respondo je demando!**

- a. sensuka
- b. ebena
- c. streĉita
- d. glata
- e. plado
- f. plato •
- g. plataĵo
- h. plata
- i. senreliefa
- j. senkaraktera

Ivo

## Radikaliĝo

de Serge HALIMI



# LE MONDE

## diplomatie en Esperanto

LA KEBEKIA studentribelo siavice montras : la politikoj de malabundo jam ne trudeblas sen aŭtoritatecaj metodoj. Kiam la liberala registaro (centrista) de [Jean Charest](#) decidis altiĝi je 75 elcentoj en kvin jaroj la kotizon por enskribi sin en universitato, pli ol triono de la studentoj de la provinco [Kebekio](#) ekstrikis ; la 18-an de majo 2012, la rajtoj je asociiĝo kaj je manifestacio estis suspenditaj en speciala sesio de la Nacia Asembleo de Kebekio (vidu Pascale Dufour : Insistemo de la kebekiaj studentoj). Jen fatala enĉeniĝo : atingi demokratian konkeron (ĉi tie : la aliron al supera instruado) kondukas sufiĉe rapide al amputado de fundamenta libereco.

Tiu radikaliĝo observeblas ankaŭ en aliaj landoj. En Francio, la malvenko de la konservativa partio, fine de elektokampanjo dum kiu tiu partio gurdus ĉiujn temojn de la ekstrema dekstrularo, neniel instigis ĝin reorienti sian retorikon al la centristaj voĉdonantoj, kiuj mankis al ĝi. La heredantoj de la prezidinto [Nicolas Sarkozy](#) male privilegias la plej reakciajn poziciojn – malamikajn al la enmigrintoj, kontraŭajn al la „puna malstrikteco”, batalon kontraŭ la impostaj fraŭdoj –, kun la espero akiri el la [ekstremdekstra] Nacia Fronto parton de popolaj elektantoj, kiuj laŭdire rekonas sin en la portreto de la „laboristo, kiu ne volas, ke tiu, kiu ne laboras, gajnas pli ol li” [1]

Malpli ol monaton post la enposteniĝo de s-ro [Barack Obama](#), Usono spertis samspecan politikan evoluon. Anstataŭ analizi sian malvenkon, la Respublikana Partio sekvis la *Tea Party*, agresema kaj paranoja, sed ĉefe sperta pri la arto prezenti siajn kontraŭulojn kiel kolektaĵo de maldesktregaj snoboj, de memismaj teĥnokratoj kaj nur kapablaj ĉikani la produktantojn de riĉaĵoj por daŭre kontentigi la „helpatojn” kaj sentaŭgulojn. „Ni preskaŭ ĉiuj havis najbaron aŭ aŭdis pri iu kiu vivis super siaj rimedoj, kaj ni demandis nin, kial ĝuste ni devas pagi por li”, tiel plendis la aŭtoroj de la „Manifesto de la Tea Party”. [2] La respublikana dekstrularo ne zorgis por rekonkeri la centron, kie onidire oni gajnas la elektojn. Ĝi revigliĝis per tio, ke ĝi anstataŭigis la grizan pragmatikon de venkitaj respondeculoj per la aspiroj de siaj plej fervoraj membroj.

... Bonvolu legi la sekvon surrete : <http://eo.mondediplo.com/article1834.html>



## La reta PIV: revo fariĝis realo

La 4an aprilo 2012 estis lanĉita longe atendata projekto – ekfunkciis reta versio de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (reta PIV). Ĉe la adreso [www.vortaro.net](http://www.vortaro.net) nun troveblas plena versio de PIV, kiu nuntempe en la datumbazo havas 16846 artikolojn kaj 47859 variaĵojn de leksikaj unuoj.

La realigo de la reta versio de PIV estas komuna projekto de SAT (kiu disponigis la enhavon) kaj E@I (kiu prizorgis realigon de la teknika laboro kaj zorgis pri la monokolekta kampanjo). Jam en la jaro 2010 komenciĝis la monokolekta kampanjo por kolekti minimume dek mil eŭrojn por pagi ĉiujn bezonatajn laborojn el tiu mono kaj sekve proponi la uzon de la vortaro al ĉiu ajn senpage.



En majo 2011 estis kolektita la bezonata sumo (efektive alvenis eĉ pli da donacoj ol la minimume bezonataj dek mil eŭroj) kaj komenciĝis la reala laboro pri la reta versio de PIV. Post la dekmonata laboro en aprilo ĉi-jara aperis la unua, “beta”-versio de reta PIV ĉe facile memorebla kaj taŭga retadreso: [www.vortaro.net](http://www.vortaro.net)

Sed la laboro pri PIV ne finiĝis – la enhavo de PIV konstante pliboniĝos. Ankaŭ teknike ĝi estos konstante plibonigata. La ĉefa strebo estis aranĝi, ke la interfaco de la vortaro estu por la uzantoj kiel eble plej simpla kaj facila. Planataj estas pluraj aldonaj funkcioj, kiuj aperados iom post iom, por ebligi bonan testadon de la tuto. Baldaŭ devos aperi eblo komenti unuopajn vortojn, diskuti ilin, proponi plibonigojn, k. t. p. (iaspeca forumo por ĉiu vorto). Same aldonado de bildoj por unuopaj vortoj estas preparata (por ke la vortaro vere iĝu “ilustrita”).

La uzado de la vortaro – danke al la financa subteno de esperantistoj – estas kaj estos senpaga por ĉiuj. Nuna ununura kondiĉo estas, ke por uzi la paĝaron, necesas unue registriĝi. Se vi jam estas registrita ĉe iu el la paĝaroj de E@I, ekz. ĉe [lernu!](http://lernu!), vi povos simple uzi la samajn datumojn.

Por la estonteco estas pluraj plibonigaj planoj kaj ideoj, sed unue la teamo bezonas prilabori la mankantajn modulojn kaj testi bone la paĝaron. Eble estonte aperos ankaŭ eblo aĉeti elŝuteblan kaj instaleblan PIV por sia komputilo aŭ poŝtelefono. Pri tiuj temoj tamen bezonatas unue interkonsentoj kun SAT, kiu daŭre restas la posedanto de la aŭtoraj rajtoj de la vortaro.

Pri la novaĵoj rilataj al PIV oni povas informiĝi ankaŭ tra “Vizaĝlibro” ĉe:

<http://www.facebook.com/vortaro.net>

La teknika teamo esperas, ke la uzantoj helpas plibonigi la retejon, sendante komentojn, rimarkojn kaj raportetojn pri la spertitaj problemoj aŭ simile. Oni sendu siajn komentojn rekte al la [teamo](#)

**Peter Baláž kaj Jevgenij Gaus**  
E@I-estraranoj

La vorto “Esperanto”, elskribita de la reta PIV

## Suno feliĉigas printempe

Dum printempo nia humoro plisereniĝas, la vestaĵoj fariĝas pli malpezaj kaj disvastiĝas printempaj sentoj. Respondecas por tio la suno. Se la lumo de nia centra stelo atingas la haŭton, elŝutiĝas feliĉohormonoj. Se la



tagoj plilongiĝas kaj la temperaturoj plialtiĝas la homoj strebas al la libera aero. La printempo ŝajnas feliĉigi nin kaj levi ĝenerale nian bonhumoron. Jen kaj jen tiu pli serena humoro estas perceptata kiel printempaj sentoj kun seksaj deziroj. Fakte la radioj de la suno havas variajn efikojn sur la homan korpon kaj psikon.

Se la sunlumo trafas la haŭton de la homo, la korpo elŝutas pli da endorfinoj, do feliĉohormonojn.

Unu el ili estas serotonino. La hormono, kiu zorgas pri multaj plurŝtupaj procezoj en la homa korpo, estas ankaŭ nomata aktivechormono aŭ mesaĝa substanco de la feliĉo. Ĝi plialtigas la ĝeneralan bonfarton, reguligas la metabolon kaj forpelas deprimojn kaj timojn. Ĝi ludas ankaŭ rolon ĉe la satiĝa sento, la digestado kaj la agordado de la tagnokta ritmo. Ĝi estas trovebla ankaŭ malaltkvante en nutraĵoj kiel ekzemple bananoj, ananaso kaj ĉokolado. Manko de serotonino kunligiĝas kun deprimoj, senaktivemo kaj senkuraĝeco kaj krome kun supermezura laceco. Paralele al la elŝutado de serotonino pro la plilongiĝantaj tagoj malpliĝas la melatonino, la dormhormono.

Plua grava substanco kiu helpe de la sunlumo estas formata en la korpo estas la vitamino D. Tiu grupo de substancoj kiu estas antaŭŝtupo de hormono, estas grava por la imunsistemo, la konstruo de la ostoj, la dentoj kaj la muskoloj. Krome ĝi povas efiki preventive kontraŭ kancero kaj kontraŭ longdaŭraj malsanoj kiel osteoporozo. La vitamino D sufiĉe formiĝas en la homa korpo nur se la sunlumo en sufiĉa intenseco trafas sur grandan pecon da haŭto, tio estas en Eŭropo nur



dum marto ĝis oktobro kaj precipe dum tagmezo. Nur montri al la suno la vizaĝon kaj la manojn, tio ne sufiĉas ĉar homoj en Eŭropo prefere amasigu iom da provizo je vitamino D en la korpa graso por trapasigi la vintran duonjaron laŭeble sen manko de vitamino D.


Apud la diversaj elŝutoj en la korpo ankaŭ la temperaturoj plialtiĝantaj dum printempo influas la sintenojn kaj kondutojn. La varmo kondukas al sinteno pli malferma, pli malstreĉa kaj pli aktiva kaj al dediĉo por aliaj homoj. Tia sentoplena sinteno denove influas nian medion, la feliĉo infektas aliajn. La ĝenerala belvetera bonfarto ĉe kelkaj homoj eĉ kondukas al pli da seksaj deziroj, al la tiel nomataj printempaj sentoj. Sed ne nur dum libertempo hela lumo povas esti utila dum printempaj tagoj. Ankaŭ por laboro la efikoj de la sunlumo estas utiligeblaj, ĉar taglumo kun sia vasta lumspekto pruveble akcelas la kapablon koncentriĝi kaj havas pozitivan efikon je la produktiveco de homo.

Por profiti ĉiujn pozitivajn efikojn de printempo oni moviĝu ĉiutage ekstere almenaŭ dum 15 minutoj, tute sendepende ĉu suno videblas aŭ ne.



Aŭskultebla ĉe :

<http://peranto.posterous.com/suno-felicigas-printempe>  
esperanto retradio <http://start.at/retradio>



## Avenaj biskvitoj

### Ingrediencoj :

- avenaj flokoj : 125g
- butero : 125g
- tritika faruno : 125g
- blonda aŭ bruna sukero : 100g
- 5 supokuleroj da likva mielo



### Preparado:

Fandi la buteron kun la mielon

Aldoni ĉiujn aliajn ingrediencojn

Miksi bone

Sur fornoplaton buteritan, ŝmiri tavolon, 1cm-on dika

Kuri dum 10 minutoj, je 180 gradoj.

Tuj post la eliro el la forno, streki kvadratojn

Rompi la kvadratojn kiam la biskvitoj estas malvarmaj



**Bonan apetiton !**

Selin



## Pakistano :

### Nacia Instituto de Esperantaj Studoj (NIES)

En Pakistano, ĵus fondiĝis Nacia Instituto de Esperantaj Studoj en la pretiĝa urbo : [Nankana Sahib](#).



(NIES) Nacia Instituto de Esperantaj Studoj  
(NIES) Ward No. 11, Near M.C. High School,  
39100 Nankana Sahib / Pakistano  
[nitespk@gmail.com](mailto:nitespk@gmail.com) , <http://www.nitespk.co.cc> ,  
kontaktnumero: +92-3135363211

Edukado kaj Turismo per Esperanto  
[Pakistano](#) apartenas al sud-azia regiono, kiu havas marbordon laŭlonge de Araba maro kaj Golfo de Omano, kaj landlimiĝas kun Barato oriente, Ĉinio nord-oriente, Afganio nord-okcidente kaj Irano sud-okcidente. Angla lingvo ludas oficialan rolon en Barato kaj Pakistano ĉar ambaŭ landoj estis kolonioj de Brita Imperio sed la demando estas ke ĉu la angla lingvo estas pli bezonata ol niaj naciaj aŭ regionaj lingvoj por faciligi komunikadon? Tute ne, ni ne povas angliĝi parolante la anglan lingvon kaj la angla lingvo povas esti pontlingvo inter anglaj triboj ne por/inter ni. Unue ni bezonas nian nacian/regionan lingvon ene de la lando, aliaflanke ni estas parto de tiu ĉi la mondo, do por komunikiĝi tutmonden ni bezonas neŭtralan lingvon, kiu apartenas al ĉiuj nacioj de tiu ĉi mondo.

NIES fondiĝis por solvi la lingvan problemon ene kaj ekstere de la lando kaj informi tiun ĉi fakton al nia popolo. NIES ne kontraŭas la uzadon de iu lingvo sed subtenas tiun lingvon, kiu faciligas komunikadon inter samlandanoj kaj Esperanton kiel la duan lingvon.

### Kio estas NIES ?

Nacia Instituto de Esperantaj Studoj (NIES) estas la neprofitcela instituto, fondita la 28an de Aprilo je la 104a datreveno de UEA kaj 125a datreveno de internacia lingvo Esperanto. NIES estas la unua instituto de la lando, kiu tute subtenas la ideon de uzado de la internacia lingvo Esperanto en edukado, instruado, turismo kaj internacia komunikado kaj simile.

### **Konstantaj Planoj de NIES:**

- instrui kaj propagandi Esperanton rete, koresponde kaj virtuale
- oferti divers-nivelajn kursojn de Esperanto kaj aranĝi siajn ekzamenojn
- aranĝi edukadajn trejnadojn pri esperantaj studoj
- interŝanĝi Esperantistajn Instruistojn
- promocii interkulturismon ene kaj ekstere de la lando
- promocii turismon per Esperanto
- fondi la unuan Esperanto-bibliotekon en Pakistano
- verki originale, publikigi kaj traduki librojn Esperanten kaj el Esperanto Urduen

### **Estraro de NIES:**

- s-ro Adeel Mahmood Butt (Direktoro)
- s-ro Farrukh Ikhtlaq (Sekretario)
- s-ro Aziz Ahmad (Kasisto)
- s-ro Prof. d-ro Agha Mahmood Yourash (Ĉef-Kunordiganto)
- s-ro Sajjad Ali (Regiona kunordiganto)
- s-ro Imran Islam (kunordiganto)

### **Klarigado de agadoj pri ĈK, RK, K kaj R:**

- **ĈK** — Ĉef-Kunordiganto reprezentas la provincion, lia agado estas gvidi, instrui kaj informi pri kursoj al RK kaj R.
- **RK** — Regiona kunordiganto reprezentas la distrikton kaj instruas e-on distrikte kaj en diversaj urboj kune kun Kunordiganto.
- **K** — Kunordiganto reprezentas sian urbon aŭ vilaĝon kaj informas pri instruado kaj aranĝo de klasoj en diversaj lernejoj kaj individue.
- **R** — Tiuj povas membriĝi kiel Re prezentanto de NIES, kiuj subtenas la ideon "**Edukado kaj Turismo per Esperanto**" aŭ volas lerni ĝin kaj labori volontule.

**JE HAZARDO DE LA BIRDOJ****AU HASARD DES OISEAUX****Jacques PREVERT**

Tremalfrue mi lernis ami la birdojn  
 tion mi iom bedaŭras  
 sed nun ĉio glatiĝis  
 ni interkompreniĝis  
 ili ne zorgas pri mi  
 mi ne zorgas pri ili  
 mi ilin rigardas  
 mi ilin lasas  
 ĉiuj birdoj klopodas kiel eble plej bone  
 ili ekzemplon donas  
 ne ekzemplon, kiel ekzemple Sinjoro Fortreso, kiu  
 tiom rimarkinde kuraĝece kondukis dum milito aŭ  
 ekzemplo de malgranda Paŭlo, kiu estis tiom  
 malriĉa kaj tiom bela kaj tiom honesta cetere kaj  
 kiu iĝis poste la granda Paŭlo tiom riĉa kaj tiom  
 maljuna tiom honorinda kaj malbela kaj tiom avara  
 kaj tiom bonfaremula kaj tiom pia.  
 aŭ ekzemple tiu maljuna servistino, kiu havis vivon  
 kaj morton ekzemplodonajn neniam ioman ajn  
 diskuto ne tiom ! la ungo kiun oni klakigas sur  
 dentoj neniu diskuto kun la Sinjoro aŭ la Signorino  
 pri tiu abomeninda afero de la salajroj  
 ne  
 la birdoj donas ekzemplon  
 la indan ekzemplon  
 la ekzemplo de la birdoj  
 birdoekzemplo  
 ekzemplo la plumoj flugiloj flugado de la birdoj  
 ekzemplo la nesto vojaĝoj kaj kantoj de la birdoj  
 ekzemplo la beleco de la birdoj  
 ekzemplo la koro de la birdoj  
 lumo de la birdoj



J'ai appris très tard à aimer les oiseaux  
 je le regrette un peu  
 mais maintenant tout est arrangé  
 on s'est compris  
 ils ne s'occupent pas de moi  
 je ne m'occupe pas d'eux  
 je les regarde  
 je les laisse faire  
 tous les oiseaux font de leur mieux  
 ils donnent l'exemple  
 pas l'exemple comme par exemple Monsieur Glacis  
 qui s'est remarquablement courageusement conduit  
 pendant la guerre ou l'exemple du petit Paul qui était si  
 pauvre et tellement honnête avec ça et qui est devenu  
 plus tard le grand Paul si riche et si vieux si honorable  
 et si affreux et si avare et si charitable et si pieux  
 ou par exemple cette vieille servante qui eut une vie et  
 une mort exemplaires jamais de discussions pas ça  
 l'ongle claquant sur la dent pas ça de discussion avec  
 monsieur ou avec madame au sujet de cette affreuse  
 question des salaires  
 non  
 les oiseaux donnent l'exemple  
 l'exemple comme il faut  
 exemple des oiseaux  
 exemple des oiseaux  
 exemple les plumes les ailes le vol des oiseaux  
 exemple le nid les voyages et les chants des oiseaux  
 exemple la beauté des oiseaux  
 exemple le cœur des oiseaux  
 la lumière des oiseaux.

esperantigis Roland Platteau



## EU rifuzas himnon en Esperanto

**La Eŭropa Komisiono oficiale rifuzis la proponon de Eŭropa Esperanto-Unio pri popoliniciato rilate kantadon de himno en Esperanto. Laŭ la motivigo de Eŭropa Komisiono, la propono kolekti subskribojn subtene al himno en Esperanto ne estas akceptebla, ĉar neniu EU-lando agnoskas Esperanton kiel parton de sia kultura heredaĵo. "EEU nun konsideras multajn eblajn reagojn, kaj evitos iun ajn hastan decidon. Ni restos prudentaj", komentas la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, Seán Ó Riain. Libera Folio publikigas la kompletan tekston de la rifuzletero en Esperanto.**

Komence de aprilo Eŭropa Esperanto-Unio sendis al la ĉefa gvidorgano de EU, la Eŭropa Komisiono, proponon, laŭ kiu EU rekomendu la kantadon de la eŭropa himno en Esperanto. La celo de la iniciato laŭ Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) estis fortigi la komunan eŭropan identecon, grandigi la partoprenon de la civitanoj en la eŭropa integriĝo, donante al ili la eblon kanti kune, kaj certigi la respekton por ĉiuj eŭropaj lingvoj.

Laŭ la reguloj de la Eŭropa Civitana Iniciato, la komisiono devis ene de du monatoj decidi ĉu la propono plenumas la formalajn postulojn. Nun pasis la du monatoj, kaj EEU ricevis la decidon, kiu estis kategoria rifuzo.

– La Komisiono malakceptis eĉ la eblon komenci kolekti milionon da subskriboj por tiu iniciato, klarigante tion per la aserto ke neniu EU-lando agnoskas Esperanton kiel sian kulture heredaĵon, skribas Zlatko Tišljár, sekretario de EEU, en retletero dissendita al aktivuloj de EEU la 1-an de junio.

**Zlatko Tišljár** atentigas ke ekzistas multaj lingvoj en Eŭropo, kiuj sendube kontribuas al la eŭropa kultura heredaĵo, sendepende de tio, ĉu ili estas oficiale agnoskitaj.



- Ni menciuj la romaan, la rusan, la kurdan, turkan, araban, ĉinan kaj multajn aliajn lingvojn en kiuj

kulture kreas milionoj da eŭropaj civitanoj. Al tiuj sendube apartenas ankaŭ Esperanto, kiu apartenas al 30 lingvoj kun la plej riĉa vikipedia materialo en la mondo, al 64 lingvoj de google-tradukiloj kaj kiu havas riĉan originalan kaj tradukliteraturon kun pli ol 100.000 libroj. Laŭ la teksto de la letero li supozas ke la Eŭropa Komisiono timas sukcesan nomkolektan kampanjon, kiu laŭ li povus "startigi tuteŭropan debaton pri la demando de efika kaj justa komunikado en EU".

- La estraro de EEU opinias skandala la decidon de la Komisiono malpermesi la aplikon de la nova leĝo al la iniciato de EEU, li skribas.

Poste Zlatko Tišljár klarigis, ke la opinioj esprimitaj en lia letero ne estas oficiala komento de EEU, sed parto de interna diskuto.

Tuj kiam la informo pri la rifuzo de la Eŭropa Komisiono atingis *Libera Folio*, ni turnis nin al EEU por ricevi pliajn informojn. En sabato ni ricevis respondon de Seán Ó Riain, la prezidanto de EEU.

Laŭ lia opinio, la Eŭropa Komisiono malĝuste interpretas siajn proprajn regulojn, argumentante ke la propono de EEU ne estas akceptebla, ĉar

neniu membroŝtato de Eŭropa Unio esprimis sian subtenon al Esperanto.

- La Komisiono rezonas kvazaŭ la celo de la propono estus antaŭenigi Esperanton. Tamen la celo estas antaŭenigi la himnon, kaj Esperanto estas la rimedo. Eble la sola rimedo kantigi la himnon, respektante la malsamajn kulturajn heredaĵojn de la membroŝtatoj. Do, se iu membroŝtato efektive subtenus Esperanton kiel parton de sia kultura heredaĵo, aliaj povus opinii ke Esperanto ne plu taŭgas kiel neŭtrala himna lingvo. Aldone **Seán Ó Riain** atentigas, ke laŭ la baza traktato pri la funkciado de Eŭropa Unio, EU ne nur kontribuu al la disvolviĝo de la kulturo de la membroŝtatoj, sed ankaŭ "reliefigu ilian komunan kulture heredaĵon".

- Esperanto estas ĝuste komuna kultura heredaĵo, ne nacia.

La estraro de EEU ankoraŭ ne decidis, kiel ĝi pluiros post la rifuzo, diras Seán Ó Riain.





- EEU nun konsideras multajn eblajn reagojn, kaj evitos iun ajn hastan decidon. Ni restos prudentaj.

EEU en sabato transdonis al *Libera Folio* la anglalingvan leteron de la Eŭropa Komisiono (kiun ni aldonis ĉi-sube - NdLR :)

## La rifuzletero de la Eŭropa Komisiono al EEU

Eŭropa Komisiono oficiale rifuzis akcepti la proponon de civitana iniciato, starigitan de Eŭropa Esperanto-Unio. Ni publikigas la kompletan tekston de la rifuzletero de la Eŭropa Komisiono al la prezidanto de EEU, en Esperanto. La traduko estas farita de Libera Folio. La originala anglalingva teksto de la letero legeblas surrete : <http://www.liberafolio.org/2012/la-rifuzletero-de-la-europa-komisiono-al-eeu> (NdLR)

**EŬROPA KOMISIONO**  
Bruselo, 30.05.2012



Temo: Via peto pri registrado de proponata civitana iniciato

Titolo de la proponata civitana iniciato:

Rekomendu kantadon de la Eŭropa Himno en Esperanto

Dato de peto pri registrado: 01/04/2012

Karaj Organizantoj,

Mi referencas al via peto de la 1-a de aprilo 2012 pri la registrado de proponata civitana iniciato kun la titolo "Rekomendu kantadon de la Eŭropa Himno en Esperanto".

Kiel difinas Artikolo 4(2) de Regularo (EU) No 211/2011 de la Eŭropa Parlamento kaj de la Konsilio de la 16-a de februaro 2011 pri la civitana iniciato, la Komisiono registru proponatan civitanan iniciaton ene de du monatoj post la ricevo de la necesaj informoj, kaze ke la sekvaj kondiĉoj estas plenumitaj:

- (a) la civitana komitato estas formita kaj la kontaktpersonoj estas indikitaj laŭ Artikolo 3(2) de Regularo (EU) No 211/2011;
- (b) la proponata civitana iniciato ne estas evidente ekster la potenco de la Komisiono fari proponon pri leĝa akto de la Unio por la celo de aplikado de la Traktatoj;
- (c) la proponata civitana iniciato ne estas evidente insulta, frivola aŭ ĉikana.
- (d) la proponata civitana iniciato ne estas evidente kontraŭa al la valoroj de la Unio, kiel ili estas

difinitaj en Artikolo 2 de la Traktato de Eŭropa Unio.

La Komisiono esploris vian proponatan civitanan iniciaton por certigi ke ĝi plenumas ĉi tiujn kondiĉojn starigitajn en la supre menciita Regularo.

Mi bedaŭras informi vin, ke sekve de ĉi tiu esploro la Komisiono jene rifuzas la registradon de ĉi tiu proponata iniciato, surbaze de tio, ke ĝi estas evidente ekster la potenco de la Komisiono fari proponon pri leĝa akto de la Unio por la celo de aplikado de la Traktatoj.

La profunda esplorado de la Traktataj dispozicioj kiujn vi sugestis kaj de ĉiuj aliaj eblaj leĝaj bazoj kondukis al ĉi tiu konkludo.

La Komisiono konsideras ke ne ekzistas leĝa bazo kiu permesus proponon por leĝa akto en la formo de via iniciato, nome la establon kaj kantadon de la Eŭropa himno en Esperanto. Specife, se konsideri kiel leĝan bazon la Traktatan titolon pri kulturo, ĉi ties ĝenerala celo estas kontribui al la disvolviĝo de la kulturoj de la Ŝtatoj-Membroj. Ĝis la nuna momento ŝajnas, ke neniu Ŝtato-Membro igis la antaŭenigon de Esperanto parto de sia politiko pri kultura heredaĵo, kaj ĝi ankaŭ ne povas esti konsiderata parto de komuna kultura heredaĵo.

Sekve la Traktatoj de EU ne donas al la Komisiono la potencon proponi la petitan leĝan akton. Se vi dezirus apelacii kontraŭ ĉi tiu decido, ni volus atentigi vin pri la eblaj manieroj de ĝustigo.

Vi povas aŭ:

- iniciati proceduron ĉe la Ĝenerala Kortumo sub la kondiĉoj specifitaj en Artikolo 263 de la Traktato pri la Funkciado de Eŭropa Unio (TFEU);

- aŭ, se vi volas plendi pri misadministrado, registri plendon ĉe la Eŭropa Mediaciisto laŭ la kondiĉoj difinitaj en Artikolo 228 de la TFEU.

Bonvolu noti ke ĉi tiu letero estos publikigita en la retejo de la Komisiono pri la civitana iniciato por informi la publikon pri ĉi tiu decido en travidebla maniero.



salutas,  
Catherine Day  
Ĝenerala Sekretario

ŝafo  
ŝafoj  
ŝafino

Prelego  
de LILA pri  
ESPERANTO  
ĉe «L'Autre Ecole»  
(pedagogio  
Freinet)



Gekaraj, merkredo vespere la 27an de junio, je la 18a kaj duono, ne maltrafu la sezonfinan vespermanĝon de EBG ĉe :

# La Cité de dragon


Chaussée de Waterloo, 1022-1024  
1180 Bruxelles (Uccle)

<http://www.citedudragon.be/>

Bonvolu alligi per telefono 0478 382 981  
aŭ ĉe [nikolao@esperantobruselo.org](mailto:nikolao@esperantobruselo.org)



Ne hezitu, venu kun akompanulo(j) !





EBGanoj en Bruĝo okaze de la 75-jariĝo de «Paco kaj Justeco»



Vizito de Probal Dazgupta ĉe EBG



En Bruĝo kun jOmO



Esperanto-Kafejo la 25an de Aprilo



Vidaŭda kurso ĉe EBG



EBGanoj en Bruĝo la 12an de Majo

